# Nia Voĉo

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: Januaro de 1991

## ESPERANTAN TAGON

La 15an de decembro ni celebris Esperantan Tagon per tagmanĝo ĉe restoracio *"Puerta de Toledo"*, okaze de la 131-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Antaŭ la manĝo, kelkaj geesperantistoj vizitis Senaton, omaĝe al S-ro *Joaquín Arce y Bodega*, la unua hispana esperantisto, bibliotekisto de Senato, kiu en 1889 petis rekte de Zamenhof tri ekzemplerojn de lia ĵus eldonita gramatiko de Esperanto. Kvindek gesamideanoj el Madrido kaj ties ĉirkaŭaĵoj kunvenis por tagmanĝi en ĝoja etoso, kaj tostis je la memoro de la genia iniciatinto de la Internacia Lingvo. Ni esperas, ke la plimulto el ili denove vidiĝos en la movado dum 1991, sed prefere ne nur la 15an de decembro... Cetere, estus ankaŭ bele se la plimulto dediĉus iom da tempo al serioza studo de iu lingvo preskaŭ tute nekonata de la granda plimulto, kiu nomiĝas... kiel diable? ho, jes: "Esperanto", aŭ io tia...

## NI KONDOLENCAS

La pasintan 23an de novembro forpasis en Valencio, post longa malsano, S-ro *Arquímedes Ballester Vaquero*. Li estis membro de Esperanta familio, mem esperantisto de frua aĝo (ekde la jaro 1934), prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo kaj tre aktiva kunlaboranto en la Esperanto-movado. Ni sincere kondolencas liajn vidvinon kaj gefamilianojn. Liaj ekzemplo kaj memoro ĉiam restos ĉe la koro de la hispanaj geesperantistoj.

## HEF-OFICEJO



Finfine, HEF-oficejo havas sian telefonan respondilon, aĉetitan de HEF kaj transdonitan de S-ro *Augusto Casquero* al S-ro *Gerardo Flores* dum la Zamenhofa manĝo. La registrota mesaĝo estos ne nur hispanlingva, sed ankaŭ Esperanta, por helpi geeksterlandanojn kiuj vizitos Madridon. La aparato ankoraŭ ne funkcias, ĉar unue estas necese ŝanĝi la konektilojn de la telefono.

## PRELEGO PRI ĈEĤIO




La 17an de decembro *Carlos Andreu* prelegis tre interese kaj sukcese ĉe MEL pri la temo "Ĉeĥoslovakio per mia korespondantino". Li detale priparolis sian vojaĝon al Germanio kaj Ĉeĥoslovakio kun sia edzino kaj plej aĝa filo, kaj ankaŭ kun kvar pliaj geamikoj. Li vizitis kelkajn ĉeĥajn urbojn, interalie la belegan Pragon, kaj renkontis sian korespondantinon, kiu loĝas en la urbo *Plzeň*. Li dismontris poŝtkartojn, fotografaĵojn kaj broŝurojn pri la lokoj kiujn li trapasis, kaj geĉeestintoj faris interesajn demandojn al li.

## EO-KURSO EN PERIODAĴO

La periodaĵo CNT *(Confederación Nacional del Trabajo)* publikigos ekde januaro Eo-kurson laŭ la metodo "Parolu Esperanton" de *José Fernández Arroyo*. En sia novembra numero, la periodaĵo aperigis duonpaĝan artikolon pri Esperanto kaj anonceton pri la korespondа kurso de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (poŝtkesto 864, 29080 Malago). Ni esperas ke, kiel tradicie, CNT-anoj amase eklernos Esperanton.

## MIGUEL GUTIÉRREZ ADURIZ EN MADRIDO

Nia aktivega samideano el *Santander* pasigis du tagojn en Madrido pro labor-vojaĝo. La 20-an de decembro li vizitis la oficejon de HEF, kie kunvenis pluraj gesamideanoj. Dum la konversacio, *Miguel* priparolis interalie la neprecon aĉeti komputoron por la oficejo, por ke ties laboro estu vere efika kaj fruktodona. Nepras havi datumaron pri geanoj de HEF, geĉeestintoj de kursoj, libroj, ktp, tio estas, ilojn por agi efike. *Miguel* transdonis al Marko provizoran programon por venonta komputor-seminario, okazonta dum venonta kunsido de HEF en Madrido, eble marte. Uzado de komputoroj en la movado nepras, se ni volas havi ian eblecon reale aliri la eksteran publikon, anstataŭ plu loĝi rezignacie en nia "malluma kavernaĉo", kiun, alie, certe neniu eniros.



## I.S. EN GERMANIO


Inter la 27a de decembro kaj la 3a de januaro okazis en la germana urbo *Finnentrop* (100 kilometrojn oriente de Kolonjo) la postkristnaska Internacia Seminario, ĉiujare organizata de Germana Esperanto-Junularo, ĉifoje sub la temo "Mezeŭropo". Marko ekvojaĝis la 25an de decembro por partopreni la kongreson, kie okazis kunveno de anoj de "Komputila Rondo". Li baldaŭ informos pri la afero.

## ONTAJ PROGRAMOJ KAJ KONGRESOJ

En januaro:
* Ĉiu-lunde ĉe MEL okazas konversacia rondo je la 19a horo.
* Ĉiu-ĵaŭde ĉe HEF-oficejo okazas konversacia rondo je la 19a horo.

7an... de januaro MELe je la 19a

* Bilanco de 1990. 7an...
* Buĝeto de 1991. 7an...
* Venonta programo de MEL. 7an...
* Elekto de novaj estraranoj. 14an...
* Demandoj kaj komentarioj. 21an...
* GENERALA ASEMBLEO DE MEL 28an...



En aprilo:
* 13an kaj 14an: 2-a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio. Loko: *Alcantarilla* (Murcio). LKK: *Santa Teresa 10, bajo A, 30005 MURCIA.*

En julio:
* de 15a ĝis 18a, Kongreso de HEF en *La Laguna, Tenerife.*
* de 20a ĝis 27a, IJK en *Karlskoga* (Svedio).
* de 27a ĝis 3a de aŭgusto, UK en *Bergen* (Norvegio).

(Kompostinto de Nia Voĉo: Marko, Acacias 44, E-28023 MADRIDO, tel.: 91-7153873)

Remite:
Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98 4°
28012 MADRID

## PARTICIPACION EN CONGRESOS

Esperanto Liceo de Madrid ha estado representado por alguno de sus miembros en los siguientes congresos y reuniones esperantistas:

.- 5ª Fiesta de Pascua de la Organización Juvenil Finlandesa de Esperanto. (Finlandia)
.- 8º Congreso Andaluz de Esperanto. Torrox (Málaga)
.- 2º Foro Juvenil Europeo. Eury (Francia)
.- 5-a Kvinpinta semajno. (Finlandia)
.- 51º Congreso de la Federación Española de Esperanto. San Cugat del Vallés (Barcelona)
.- 75º Congreso Universal de Esperanto. La Habana (Cuba)
.- 3er Congreso Asturiano de Esperanto. Gijón (Asturias)
.- 46º Congreso Internacional de Jóvenes Esperantistas. Playa Girón (Cuba)

## OTRAS ACTIVIDADES

.- Se han mantenido las siguientes tertulias en Esperanto:
Todos los lunes en la sede de Esperanto Liceo de Madrid
Todos los jueves en la oficina de la Fed. Esp. Esperanto.
Una vez al mes en el Ateneo de Madrid

.- El Liceo ha iniciado las gestiones para corregir la base de datos BISE, del programa PIC del M. de CUltura, en relación con los libros en Esperanto existentes en la Biblioteca Nacional.

.- Se ha coordinado la relación inter-congreso de la directiva de la Federación Española de Esperanto, convocando reuniones en la oficina central de Madrid.

.- Los miembros del Liceo han acompañado y asistido a numerosos esperantistas extranjeros que han visitado Madrid

.- La actividad creadora de los miembros de MEL se ha visto premiada a nivel internacional, un miembro del Liceo obtuvo en el concurso de Bellas Artes de la Asociación Universal de Esperanto, 2 premios en poesía, 2 en prosa y uno en ensayo.

.- El coro "Verda Stelo", apoyado por el Liceo, ha seguido incluyendo el Esperanto en su programa de polifonía religiosa y profana y en especial en la canción popular internacional.

Madrid 31 de dicimebre de 1990

Secretaria
G. Sanz Bueno

Presidente
J.Mª González Aboín.

# MEMORIA DE ACTIVIDADES

## ESPERANTO LICEO DE MADRID

## AÑO 1990

Destacamos como actividad principal la tertulia "Amigos del Esperanto" que una vez al mes se ha llevado a cabo en el Ateneo de Madrid, continuando con ella la labor a favor de la lengua internacional comenzada por esta institución madrileña en el primer cuarto de este siglo.

A nivel internacional ha destacado un miembro del Liceo, Jorge Camacho, por la obtención de 5 premios literarios otorgados por la Asociación Universal de Esperanto.

A continuación relacionamos las actividades llevadas a cabo durante el año 1990 por Esperanto Liceo de Madrid (Madrida Esperanto Liceo) (MEL)

## ENSEÑANZA

La difusión del idioma Esperanto es el fin primordial de MEL. Durante 1990 se han organizado cursos básicos y de perfeccionamiento, siguiendo fundamentalmente el método "EK", cuya eficacia se ha demostrado un año más al permitir a los alumnos incorporarse a las tertulias en Esperanto, después de 70 horas lectivas.

Se organizaron cursos en los siguientes lugares:

.- Locales de Esperanto Liceo de Madrid
.- Oficina Central de la Federación Española de Esperanto.
.- Casa de Cantabria
.- Centro Cultural Ventas. Maestro Alonso 6.

## CONFERENCIAS

Como es habitual el programa de MEL ha incluido conferencias sobre diversos temas, empleando siempre el idioma Esperanto. Algunas fueron impartidas por esperantistas extrajeros. Se programaron las siguientes:

.- Tra la mondo per Esperanto. Maritza Grazziani
.- Hispana folkloro. L. Sanz Bueno
.- Mapoj kaj geografiaj nomoj. J.Mª González Aboín.
.- Vojaĝo al Budapeŝto kaj Vieno. C. Andreu
.- Sur la spuroj de Federico García Lorca. M. Fernández Martín
.- La KOngreso de Sant Cugat. J.C. Ruiz Sierra.
.- Kongresi en Kubo. J. Navareño Fernández
.- Mia restado en Finlando. M. Cruz
.- Ĉekoslovakio per mia korespondantino. C. Andreu.
.- Pasporta servo en Francio. J.A. del Castillo.

## PUBLICACIONES

En espera de las subvenciones necesarias para editar las obras que actualmente se están escribiendo, Esperanto Liceo de Madrid ha seguido publicando mensualemnte el boletín informativo "Nia Voĉo", distribuido a todos los socios y grupos esperantistas españoles.

CONFERENCIAS

Como ya es habitual se programarán conferencias en Esperanto impartidas por los propios miembros del Liceo o por invitados especiales.

Al margen del programa normal de conferencias, el Liceo aprovechará la estancia en Madrid de esperantistas extranjeros o de otros lugares de España, para ofrecerles la posibilidad de dar charlas sobre temas de actualidad científica, artística o social. El programa inmediato de conferencias incluye las siguientes:

"Instrumentos musicales: el quatro"

"Gramática comparada"

"Didáctica del Esperanto"

"El flamenco"

PROYECCIONES

En ciclo alternante con las conferencias se programarán proyecciones de películas, vídeos y adiapositivas doblados o comentados en Esperanto. Para el desarrollo de esta actividad se aprovechará la visita de esperantistas extranjeros que aporten material gráfico de los grupos esperantistas de su país.

OTRAS ACTIVIDADES

El aspecto socio-cultural de los socios será tratado especialmente desarrollando las siguientes actividades:

.- Excursiones

.- Encuentros con otros grupos esperantistas

.- Visita colectiva a museos y exposiciones

.- Tertulias en Esperanto (una vez al mes en el Ateneo de Madrid y dos veces por semana en las sedes del Liceo y de la Federación Española de Esperanto.)

.- Organización de viajes colectivos para asistencia a congresos de Esperanto.

.- Ayuda y apoyo para el desarrollo de las actividades del coro y orquesta "Verda Stelo"

Madrid 31 de diciembre de 1990

Secretaria

Presidente

Esperanto Liceo de Madrid
Atocha 98.28012 Madrid

A continuación se resume el programa de actividades previstas para el próximo año de 1991

## ENSEÑANZA

El fin principal de Esperanto-Liceo de Madrid es la difusión y enseñanza de la lengua internacional Esperanto. Para ello se llevarán a cabo cursos básicos y abazados a cargo de profesores del Liceo. Para el año 1991 está previsto impartir clases en los siguientes lugares:

.- Sede de Esperanto-Liceo de Madrid. Distrito Centro
.- Oficina de la Federación Española de Esperanto. Chamberí
.- Hagar del Jubilado "Puente de Toledo"
.- Casa de Cantabria.

## TRADUCCIONES Y PUBLICACIONES

Como contribución al Congreso Internacional de Esperanto que ocurrirá en Valencia, en 1993, se están traduciendo al Esperanto las siguientes obras:

.- Los museos españoles. Folleto del M.Transportes/Turismo
.- Niebla de M. de Unamuno.
.- Antología poética de V. Alexandre

Si se consiguen las subvenciones necesarias se editará en bilingüe español-esperanto la obra "Historia del movimiento esperantista en Madric"

Mensualmente se publicará el boletín informativo "nia Voĉo" que se distribuye entre los miembros del Liceo y los grupos esperantistas españoles.

## BIBLIOTECA Y VIDEOTECA

La biblioteca, actualmente en proceso de informatización, cuenta actualmente con cerca de 700 volúmenes. El presupuesto dedica anualmente una importante partida a la adquisición de las publicaciones más interesantes que aparecen en Esperanto durante el año.

El Liceo tiene suscripción a las más importantes revistas que actualmente se editan en Esperanto, ello permite seguir de cerca los acontecimientos que ocurren en el mundo esperantista.

La videoteca, de rec iente creación, va tomando importancia como medio de difusión de la cultura en Esperanto.

# NIA VOCXO

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: 75 Februaro de 1991

## MEL-BILANCO DE 1990

Cxi tiu bilanco estis prezentita dum la gxenerala kunveno okazinta la 28an de januaro cxe MEL:

| | |
|---|---|
| ENSPEZOJ | |
| Bankaj interezoj | +82.443 |
| Membro-pagoj | +112.438 |
| Donacmono | +13.467 |
| Vendo de libroj kaj aliajxoj | +109.015 |
| Telefono | +825 |
| Loterio | +129.725 |
| SUME | +447.913 |
| ELSPEZOJ | |
| Ejluo | -195.296 |
| Telefono | -15.597 |
| Elektro | -12.012 |
| Abonoj | -14.107 |
| Redonoj de membro-pagoj | -6.024 |
| Acxeto de libroj kaj aliajxoj | -145.391 |
| Konservado | -400 |
| Loterio | -21.500 |
| Nia Vocxo | -16.243 |
| Diversaxjoj | -2.000 |
| SUME | -428.570 |
| Rezulto de 1990 | +19.343 |
| Sumo en bankkonto je 29/12/90 | 193.726 |
| Sumo en banko por difinita periodo | 950.000 |
| ENTUTE | 1.143.726 |

## NOTO DE LA REDAKTISTO

La komputoro QL estas nun denove riparota. Tiun cxi numeron mi kompostis per komputoro ZX Spectrum kaj programo Tasword-2. Kiel malplej malbonan solvon mi elektis cxifoje anstatauxi supersignojn per la neesperanta litero "x". Kelkaj koleros, mi supozas. Cxi tiu solvo, jam ofte uzata kiam ajn ne eblas io pli bona, estas pli klara ol uzi la literon "h", kaj ne tiel fusxa kiel supesigni mane. Venonta numero de Nia Vocxo ree havos sian kutiman sxajnon - do ecx supersignojn.
Markos kore salutas ecx ankaux la kolerintojn!

## AUXTOMATA RESPONDILO

Finfine la centra oficejo de HEF havas funkciantan auxtomatan respondilon, kaj gxi jam pruvis sian senduban utilecon: kelkaj homoj telefonis kaj registris siajn mesagxojn por peti informojn pri Esperanto. Markos okupigxas pri posta telefonado kaj posxta sendo de informoj.

## KOMPUTORIGADO

Estas nun enkomputorigataj de Markos la bibliotekoj de HEF-oficejo kaj MEL, la membrolisto de MEL kaj BEK-kurso. Ambaux bibliotekoj estos baldaux perfekte organizitaj kaj uzeblaj helpe de Ana, Fernando kaj Maritza. Kompostado de BEK-kurso dauxros iom pli, sed la rezulto vere valoros la penon - do paciencon.

## JUNULARA EO-TENDARO EN VALENCIO

Inter la 28a kaj 31a de morto okazos en Valencio tendaro nun organizata de Juna Suno. La tendaron partoprenos reprezentantoj de diversaj junularaj Eo-asocioj el la tuta sxtato, kaj gxi estos unua pasxo por la revivigo de HEJS. Interesatoj pri la tendaro kontaktu Markos (91-7153873 matene kaj 91-5532936 vespere) aux Alberto-n (96-3340759). Programeroj estas bonvenaj.

## REVIVIGO DE HEJS

Iñaki Gauna, kiu sur sin prenis la senesperigan taskon kunordigi kaj revivigi la preskaux mortintan Hispanan Esperantistan Junularan Societon, eldonis dank-al la financa subteno de Antonio Alonso Núñez, numeron de HEJS-JUNECO kiel senesperan alvokon al cxiuj esperantistaj gejunuloj el la sxtato kaj instigon al kuna agado. Dum la tendaro okazonta en Valencio oni longe priparolos difinitajn proponojn por vivigi la junularan movadon en Hispanio. Iñaki kaj Markos jam interkonsentis pri perkomputora tajpado kaj kompostado de venontaj numeroj de HEJS-JUNECO fare de cxi-lasta. Aliaj komencaj agadoj estos scii kiom da homoj reale apartenas al HEJS, kiom da ili pretas vere agi kaj kiel, kaj fine kunordigi cxies kapablojn en komence malgrandajn pasxojn por iom post iom agi efike kaj akiri suficxan nivelon de vera kaj vivanta organizajxo. Nepros ankaux kontakti kun eksterlandaj junularaj Esperanto-organizoj, ekzemple partopreni en la revuo Koncize, kune farata de la junularaj organizoj de Britio, Flandrio, Finnlando, Francio, Germanio, Italio, Nederlando kaj Svedio.
UK okazos en 1993 en Valencio. Ne estas multa tempo, estas neniom da mono kaj mankas sperto - cxu ankaux IJK povos okazi en Hispanio en 1993?!

## VENONTAJ PROGRAMOJ

Cxiulunde cxe MEL je la 18a gxis la 19a: tempo por administraj, libraj, informaj kaj diversaj aferoj.
Cxiulunde cxe MEL je la 19a: Konversacia rondo.
Cxiujxauxde cxe HEF-oficejo je la 19a: Konversacia rondo.
18an de februaro cxe MEL je la 19a: Micxjo prelegos pri Poezio.
20an de februaro cxe Ateneo: Konversacia rondo.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n° 98 . MADRID - 28012

chas Entidades le son concedidas por los Organismos de la Administracion, que revertirian en las actividades del Liceo.

Se acuerda que Juan Navareño y Luis Gonzalez, recaben del Ayuntamiento de la Junta de Distrito, la informacion sobre las disposiciones dictadas para alcanzar dicha declaracion=

Lupe Sanz, propone la posibilidad para este ejercicio de hacer una loteria unica conjuntamente con la Federacion de Esperanto, tambien propuso la conveniencia de cambiar la venta de la loteria de Navidad por la del Sorteo del Niño. Jose Maria Aboin quedo encargado de contactar con la Federacion para estudiar la posibilidad de la unificacion de la loteria de Navidad, quedando para mas adelante la discursion sobre la conveniencia o no de cambiar la loteria Nacional por la del Sorteo del Niño.

Miguel Fernandez, pregunto a cuantas revistas esta abonado el Liceo.

Lupe le contesta que las subcripciones son a: Monato, Heroldo, Popola Ĉinio, Esperanto de U.E.A. y Kontakto.

Platas propone que aprovechando el dia de actividades del Liceo, se estudie la conveniencia de que todos los lunes de 18 a 19 horas, se realicen las tareas administrativas del ~~Liceo~~ mismo, con el fin de poder participar los miembros de la Junta Directiva en las actividades del Liceo, lo que queda acordado por unanimidad.

Sin mas asuntos que tratar el Presidente levanta la sesion a las 21 horas.

EL PRESIDENTE EL SECRETARIO

ENVIAD COMENTARIOS A MEL
ANTES DEL 30 de marzo

## ACTA

En la Sede del M.E.L., a las 19 horas, del día 28 de enero de 1991, se celebra la Asamblea General Ordinaria, con la asistencia de 6 socios y 6 miembros de la Junta Directiva. Se siguio el Orden del día, segun la convocatoria anunciada en el "Nia Voĉo" de enero de 1991.

1.- LECTURA Y APROBACION, SI PROCEDE, DEL ACTA ANTERIOR.

Se procede a la lectura del Acta de la Junta anterior, quedando aprobada por unanimidad.

2.- PRESENTACION Y APROBACION, SI PROCEDE, DE LAS CUENTAS DEL EJERCICIO 1990.

Se leyó el Balance Economico de dicho año, por parte del Tesorero, quedando un saldo a favor del Liceo de 19.343 pts. aunque en este Balance no se ha podido reflejar en el apartado de ingresos las cuotas correspondientes al tercer trimestre de aquellos socios que pagan a traves de banco, ya que el banco solicita una cantidad al Liceo, en concepto de gastos por efectuar dicho cobro. Tampoco se ha podido reflejar en el capitulo de gastos las cantidades correspondientes al alquiler de la Sede del Liceo, de los meses de noviembre y diciembre, por no haberlos presentado al cobro el arrendador, Se hace constar que en el apartado de compra de libros y otros objetos (camisetas), queda un importante "stock" de los mismo, por lo que parte de estos gastos son imputables al ejercicio economico del año 1991.
El Balance quedo aprobado por unanimidad.

3.- PRESUPUESTO PARA 1991.

Se presenta un presupuesto por valor de 600.000 pts., contando con el donativo del coro y de la orquesta, que se ha comprometido a pagar la mitad de los gastos correspondientes al alquiler del local de la Sede y de la luz y telefono.

Se acuerda por unanimidad subir la cuota de los socios a 2.000 pts al año, debiendo abonarse la misma en efectivo y en pago unico, debido a los gastos que acarrea el tremite de cobro a traves de banco. El pago de los mismo se realizara en la Sede del M.E.L.

4.- PROGRAMA DE ACTIVIDADES.

Se acuerda por unanimidad que se siga con el mismo programa de actividades que en el ejercicio anterio, especificando que los dias de reunion de los socios para ellas, seran los lunes en el Liceo de 19 a 21 horas y los terceros miercoles de mes a las 19 horas en el Ateneo de Madrid.

5.- RENOVACION DE CARGOS DIRECTIVOS.

Los cargos renovados fueron: Contador, vocal juvenil, vocal de biblioteca. La Junta Directiva quedo aprobada por unanimidad como sigue:

Presidente: Jose Maria Gonzalez Aboin
Vicepresidente: Pedro A. Garrote Escribano
Secretaria: Guadalupe Sanz Bueno
Vicesecretaria: Carmen Suarez Fernandez-Cid
Vocal Secretaria: Juan Carlos Ruiz Sierra
Tesorero: Jose Francisco Platas
Contador: Luis Gonzalez Gonzalez
Vocal Tesorero: Carlos Andreu Seoane
Bibliotecario: Jorge Magdaleno Cano
Vocal Biblioteca: Ana Maria Manero Garcia
Relaciones Publicas: Miguel Fernandez Martin
Vocal Juvenil: Marcos Cruz Martinez
Vocal Enseñanza: Pedro A. Garrote Escribano.

6.- RUEGOS Y PREGUNTAS.

Juan Carlos Ruiz propone la conveniencia de adquirir para el Liceo Madrileño de Esperanto la condicion de Entidad de Utilidad Publica, para poder obtener las subvenciones que a di-

NIA VOCXO

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

Ekzempleroj: 125 Marto de 1991

## PLI DA IKSOJ

Bedauxrinde, sxajne unu plian fojon vi gxuos tiun cxi nezamenhofan litereton. La komputoro dauxre cxe-riparejas, kaj tiu pruntdonita de Juan Carlos ne tauxgas, cxar ne havas suficxan memoron por funkciigi la tauxgan tekstoprilaborilon.

## MEL-JARKOTIZO

Laux la lasta jara gxenerala asembleo, jarkotizo altigxis gxis 2000 pesetoj. Oni petas al cxiuj MELanoj pagu la tutan jaron per unu fojo, kaj prefere cxe MEL, lunde antaux konversacia rondo, cxar banko altigis sian profit-tiomon. Oni akceptos ankaux cxekon je la nomo "ESPERANTO Liceo de Madrid". (*)
(*) Jes, mi scias, tiu nomo kontrauxas la gramatikojn hispanan kaj Esperantan! Kiulingve estas la oficiala MEL-nomo? (Markos).

## EKSA KONVERSACI-RONDO

Ne plu okazos cxe HEF-oficejo konversacia rondo, se tia povus oni nomi tiun hispanlingvan klacxadon! Eble iuj ne tute komprenis: NENIAM PLU OKAZOS KUNVENO EN HEF-OFICEJO, NENIUN TAGON. La oficejo estas purigata, ordigata, farbota, meblota... Lastan fojon: HEF-OFICEJO NE PLU HAVAS KONVERSACIAN RONDON! Kompreneble, labor-volontuloj kapablaj paroli Esperanton estos bonvenigitaj. (Pliaj detaloj haveblas de Markos, 7153873).

## NOVA VERE KONVERSACIA RONDO

GXis nun monate cxiun trian merkredon okazis hispana-esperantacxa klacxado cxe Ateneo, nomita "Tertulia Amigos del Esperanto"... La nomo mem diris cxion, cxu ne? Tiu gxis nun tiom "amikema" rondeto de nun estas VERA konversacia rondo esperantista (se iu dubas pri sia esperantisteco, eblas sin gvideti laux la deklaracio pri esperantismo aprobita en 1905 dum la 1a UK... sed pli utilos al tiuj gramatiko de la lingvo kaj horoj da vera studado... ne estas tro dangxere studi unufoje iomete cxiun jardekon). Kompreneble, pro evidentaj tialoj, la nomo estos "Amigos del Esperanto". Fakte, nenecesas nomo sed KAPABLAJ geesperantistoj. Cxiuj tiaj bonvenigitos:

20AN DE MARTO
CXE ATENEO (PRADO 21)
JE LA 19A HORO
VERE KONVERSACIA RONDO

## ORKESTRO "VERDA STELO"

Tre sukcese, la orkestro kiun gvidas Pedro Vilaroig ludis dum pli ol unu horo en la pregxejo de "Hermandades del Trabajo". La programo estis varia kaj la 25 instrumentistoj estis forte aplauxditaj.

AL ESPERANTAJ GRUPOJ orkestro kaj koruso "Verda Stelo" oferas sian esperantan programon por kongresoj, renkontigxoj kaj esperantaj eventoj. Bonvolu peti de MEL bugxeton.

S-ro Aboín emeritigxos je la fino de marto. Ni deziras al li felicxan novan vivon kaj kalkulas je parto de lia libertempo por Esperanto.
José María González Aboín estas prezidanto de MEL, kaj HEF-reprezentanto en la madrida oficejo. GXis nun li laboris kiel geografo en Nacia Geografia Instituto, kaj, kiel sciencisto kaj specialisto, estis membro de diversaj internaciaj komisionoj, kie li proponis Esperanton kiel laborlingvon kaj helpilon por internacia interkomprenigxo.
MEL celebros la emeritecon de sia prezidanto pere de bankedo dum la monato aprilo (eble sabate la 13an aux dimancxe la 14an).

## HEF-KUNVENO

La 9an de marto okazos en Madrido kunveno de HEF. Matene, probable je la 9a horo, oni kunsidos en la HEF-oficejo, kaj vespere en MEL. Eble ankaux la 10an de marto okazos kunsido, depende de la plenumo de la tagordo.

## T-CXEMIZOJ

Ankoraux restas kelkaj T-cxemizoj, cxiu je 600 pesetoj.
Pro acxeto de almenaux 20, kosto po unu igxas 480 pesetoj.
CXiam aldonu eblajn sendokostojn.

## HEF-KONGRESO

De la 15a gxis la 19a de julio okazos la 51a HEF-kongreso en Tenerife. Grava programero estos arta kaj lirika festo organizata de Miguel Fernández, kiu jam havas apogon de eminentaj verkistoj.
Pedro kaj Laura, niaj gedirektoroj de koruso "Verda Stelo" kunlaboros en la muzika parto.

## TELEFONADO

GXis MEL havos sian auxtomatan respondilon propran, oni povas uzi tiun de la HEF-oficejo: 91-4468079.
La telefonnumero de MEL (lunde vespere): 5308798.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n°98. MADRID-28012

// Nia Voĉo
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Ekzempleroj: 75 Aprilo de 1991

## REFORMO DE STATUTOJ

La estraro nomis la pasintan 11-an de Marto jenan komisionon por labori pri la aktualigo de la statutoj de MEL: Juan Carlos Ruiz, Lupe Sanz kaj José María G. Aboín.

## FINFINE KELKAJ HOKAS!

La 9an de Marto HEF kunsidis en Madrido. Per oficiala voĉdonado naskiĝis tiam komisiono konsistanta el José María G. Aboín, Markos Cruz Martín kaj Georgo Kamaĉo. La celo de HOKo (HEF-Oficeja Komisiono) estas la realigo de plano por la vivigo de CO, kies skizo estis poŝtita de Markos al Antonio Alonso Núñez antaŭkunside. La laborado-organizado jam komenciĝis, kaj ekdonis fruktojn. Ĉiu preta kunlabori venu en la CO-n (Rodríguez San Pedro 13 3° 7) merkrede je la 18-a, aŭ en Ateneon se la 3-an merkredon de la monato. Cirkulero pli detala jam sendita al pli ol 100 madridaj geesperantistoj.

En un próximo número se publicará el acta de la reunión de HEF.

## VOJAĜO AL HEF-KONGRESO

Barcelona Esperanto-Centro organizas vojaĝon tien. Nura vojaĝo (ira kaj revena): 30000 pesetojn; vojaĝo plus unu semajno en Tenerife: 50000 pesetojn. Pliaj detaloj haveblas de la centro: 93-2402662.

## ĈEFINE ĈE L' ADIAŬ

Ekde la venonta numero de Nia Voĉo, Pedro Garrote okupiĝos pri tajpado kaj kompostado (kaj ankaŭ pri la penega gramatika korektado de la senditaj tajpotaj tekstoj!). Mi okupiĝados de nun pri la laborego ĉe CO de HEF, por la sukcesa realiĝo de la plano de HOKo. Dankon al ĉiuj kiuj dum mia dejoro sendis tekstojn por Nia Voĉo aŭ telefonis proponante pri ĝi. Markos.

Nota: La autora de los "penegaj tekstoj",muy a su pesar, seguirá siéndola, hasta que algún esperantista de "élite" se quiera hacer cargo de la redacción de nusstro boletín, único lazo de unión para los casi 80 socios al corriente de pago.

Las noticias que aparecen en español en este número no han sido corregidas, pido perdón por los posibles errores. LUPE

## HOMENAJE A ABOIN

La comida prevista para el día 13 de abril se ha pospuesto hasta otra fecha aún no fijada, el motivo ha sido el viaje a Cáceres durante ese fin de semana.

## OFICINA DE HEF

Gracias al trabajo, el esfuerzo y sobre todo a la tenacidad de Marcos Cruz la oficina de Rodriguez San Pedro ha sido reparada, pintada y reamueblada. Lamentablemente aún no se ha resuelto la cuestión económica. Los donativos son bien recibidos.

## P R O G R A M A   P A R A   A B R I L

Todos los lunes a las 19,00 h. tertulia en Atocha 98-4º

Todos los miércoles(excepto el día 17) reunión de trabajo en Rodriguez San Pedro 13

Día 17 de abril a las 18,00 h. tertulia "Amigos del Esperanto" en el Ateneo de Madrid. Calle Prado nº 21.

Día 22 de abril a las 19,00 Juan Carlos Ruiz disertará, en Esperanto, sobre "La situación en El Golfo Pérsico"

Día 29 de abril a las 18,30 en primera y a las 19,00 en segunda convocatoria Asamblea General Extraordinaria.

El fin de semana 13/14 ,de abril se organizará un viaje a Cáceres para asistir al encuentro anual hispano-luso de Esperantistas. Se irá en tren. Miguel Fernández pronunciará una conferencia sobre la obra de F. García Lorca.

## CONVOCATORIA DE ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA

El Presidente de Esperanto-Liceo de Madrid convoca, para el próximo lunes día 29 de abril, en primera convocatoria a las 18,30 y en segunda a las 19,00, a todos los socios, a la Asamblea General Extraordinaria que se desarrollará según el siguiente orden del día:

1.- Lectura y aprobación, si procede del acta de asamblea anterior
2.- Discusión y aprobación/desaprobación de estatutos.
3.- Ruegos y preguntas.

## SUBVENCIONES

Continuando con la política de petición de ayudas a organismos oficiales, MEL ha solicitado dos subvenciones de 500.000 pts cada una, a la Comunidad de Madrid y al M. de Relaciones con las Cortes. El objeto de la ayuda es la edición de 2.000 ejemplares del libro "La fenomeno Esperanto" de W. Auld en su traducción al español que está siendo concluida por Marcos Cruz.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n°98. MADRID - 28012

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n° 98. MADRID - 28012

Majo 1991

ESPERANTO EN EEK (Europa Ekonomika Komunumo)
Parlamentano Sro. Harrison el Svedio demandis al la komisiono pri la uzo de artefaritaj lingvoj kiel INTERLINGVA aŭ ESPERANTO, en la Europa Komunomo. La respondo estis ke en EEK nun estas oficialaj la "oficialaj lingvoj" de la statoj mem kaj, ke laŭ la programo "Lingua" oni vigligas la lernadon de eksterlandaj lingvoj. La edukaj Ministroj celas oferi al la gelernantaro la eblecon studi minimume alian lingvon de la EEK. (DOCE N' C-85 - 28.3.91).

KONGRESOJ

- Kataluna - La 25a kataluna kongreso okazos en Tarragona de la 1a ĝis la 3a de novembro 1991.
  LKK : KAE. Poŝkesto 290 - 08002 SABADELL.

- Itala - La itala kongreso okazos en Torino de la 23a ĝis la 26a de julio, kun postkongresaj ekskursoj. Organizas ĉefe Gian Carlo Fighiera.

- Hispana - La hispana kongreso okazos en La Laguna (Tenerife) ekde la 14a ĝis la 19a de julio. En Madrido Miguel Fernandez (Miĉjo) preparas "Lirikajn Horojn" kiel gravan programeron de la Kongreso.

KORUSO KAJ ORKESTRO

Nia koruso kaj orkestro "Verda Stelo", kiujn gvidas majstre Pedro Villaroig, ludis dum aprilo en kelkaj kulturaj centroj en Madrido kaj Guadalajara.

JADRAKE OMAĜIS ESPERANTON

La 7an de aprilo la kultura asocio "Reconquista" omaĝis al la Madrida Esperanto Liceo (MEL) pro ĝia konstante partopreno en la festoj de "Las Migas" (La panaĵoj). MEL ricevis platon kiel memoraĵon. Dum la akto ludis la Orkestro kaj la Koruso "Verda Stelo".

MALBONAJ NOVAJOJ

La 6an de aprilo subite forpasis la patro de Maribel, edzino de Juan Carlos Ruiz. Ni kondolencas la familion pro tiu grava perdo. Ni recevis ankaŭ malĝojigan sciigon de Valencio; Sro. Jose Soler Sempere mortis.

TENDARO EN VALENCIO

20 homoj, pli malpli, partoprenis en la junulara renkontiĝo organizita de "Juna Suno". Oni debatis multe pri la nuna situacio kiu estas preskaŭ ĥaosa. Estas eble ke Madrido organizu renkontiĝon junularan sed ne antaŭ la jaro 1993.
La manko de junaj homoj ĵetas la tutan respondecon sur la samajn kaj malmultajn personojn, kaj pro tio estas necese labori en la lokaj grupoj por fari esperantistojn.

## RENKONTIĜO EN CACERES

Ekde la 13a ĝis la 14a de aprilo okazis en Caceres renkontiĝo inter hispanaj kaj postugalaj esperantistoj. En tiu kunveno partoprenis kvin esperantistoj madridaj.
Ĝi estis organizita de la Ekstremadura Esperantista Grupo, kies zorganto, Francisco Cabezas atingis la plej bonan resulton.
Okaze de tio, estis du aferoj kiuj interbatalis por esti la plej rimarkinda. Kompreneble la unua estis la belega kaj aŭdinda prelego pri LORCA de nia kara Miĉjo. Li, denove, altiris la atenton, kaptis la koron de ĉiuj ĉeestantoj kaj sukcesis malkovri la belecon de la poezio de LORCA al la portugaloj , kiuj bedaŭrinde konis preskaŭ nenion pri ĝi. (Kiel bedaŭrinde estas ankaŭ ke ni konas preskaŭ nenion pri ilia kulturo). La dua estas la tre agrabla etoso kiu regis la renkontiĝon. Anoj el du popoloj, kiuj malgraŭ la proksimeco de la landoj estas prekaŭ nekonataj iuj de la aliaj,sukcesis interparoli, ridi kaj amikiĝi kune.

La mezepoka aspekto de la urbo ankaŭ havis gravan rolon pro tio, ke ĝi okazigis la magian etoson meze de kiu disvolviĝis la tuta afero.

### ONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

.-ĉiu-lunde ĉe MEJ (Atocha 98) okazas konversacia rondo je la 19-a horo

.-ĉiu-merkrede je la 18-a horo labor-kunveno ĉe HEF-CO (Rodriguez San Pedro 13-3º)

15-a de majo komuna grimpado al "Manoj de Viana" (apud Trillo, Guadalajara).Foriro je la 9-a ĉe metroo Avda. America

30-a de majo vizito al museo de artoj kaj popolaj tradicioj. Foriro je la 17,30-a ĉe Plaza de Castilla

**nia voĉo**
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98 . MADRID - 28012

DEVUELTO
RETOUR

Se ausentó

N I A V O Ĉ O

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º

28012 Madrid JUNIO 1991

APRILA PRELEGO

Kiel kutime Juan Carlos majstre parolis pri la milito en la Golfo. Li kolektis kompletan dosieron kiun li resumis. La prelego, kiu inkludis historion de la regiono kaj diversajn kialojn kiuj provokis la militon, laŭ la diroj de la ĉeestantoj estis "La patrino de ĉiuj prelegoj". Post la parolado sekvis konversacia rondo tre vigla.

KAFEJA KUNVENO

Denove kelkaj geesperantistoj kunvenas ĉe kafejo. Nun la kunveno okazas ĉe la parko "Retiro" teraso "La Gruto" ĉiu jaude vespere, oni renkontiĝas por paroli NUR EN ESPERANTO. Estas bonvenaj ĉiuj kiuj havas bonan parol-nivelon.

ORGANIZADO KAJ ARĤIVO

MEL aĉetis metalan bretaron por meti sian arĥiv-materialon. Oni enskatoligis kolektojn de revuoj, kaj aliajn paperaĵojn kaj bone aranĝis arĥivon kaj bibliotekon.
Ankaŭ la koruso/orkestro "Verda Stelo" ricevis la bretaron kiu estis en HEF-OFICEJO. Ni esperas ke ekde nun la sidejo de MEL estos pli ordigita kaj pura. (Se vi ne venas al MEL antaŭ kelkaj monatoj, vi ne konas la novan vizaĝon de la stuparo kiu estis farbita kaj purigita. O Ve, Se Maria levus sian kapon.

MESO EN ESPERANTO

La kompetenta Vatikana instanco pri liturgio aprobis meslibron en E-O redaktitan de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista). Ankaŭ Vatikano publikigis normojn por la celebrado de la meso en E-O. Ambaŭ tekstojn kaj normojn oni rajtas uzi en meso por kongresanoj, sed ne en aliaj okazoj. Krome oni ne rajtas uzi Esperanton por aliaj sakramentoj. Estas la unua jaro, ke Vatikano oficiale aprobas liturgian tekston en E-O.

ŜANĜO EN STATUTOJ

La 29an de aprilo MEL faris eksterordinaran asembleon por ŝanĝi sian statutojn. La komisiono "ad-hoc" decidis nur revizii, momente, la unuan artikolon, kiu rilatas al agad-loko de MEL: En la antikvaj aperis Madrido provinco kaj oni ŝanĝis al MADRIDO URBO. La kialo estas la ebleco de esti nomita "NAJBARA ASOCIO" . Partoprenantoj aprobis unuanime la modifon. La komisiono ankoraŭ laboros en la aktualigo de la teksto kaj de aliaj artikoloj rilate la tipojn de membroj, k.t.p.

.2

ESPERANTO PER RADIO

Radio-Stacio de Madrido "Onda Verde" oferis al MEL elsendi, ĉiusemajne, programon en E-O aŭ rilate Esperanton. La afero estas alloga, interesa, kaj plen-labora, sed MEL akceptis defion kaj oferis, ekde oktobro, duonhoran programon, unu fojon semajne. Ni akceptas sugestojn, kunlaborantojn kaj kompreneble aŭskultantojn.

ONTAJ PROGRAMEROJ EN MADRIDO

JUNIO

- ĉiulunde je la 19a horo, konversacia rondo ĉe MEL (Atocha, 98-4').

- ĉiumerkrede je la 18a horo laborkunveno en HEF-CO (Rodriguez San Pedro 13-3').

- ĉiujaŭde je la 18,30 horo en tereso "La Gruto" (malan- taŭ la monumento apud la lageto de parko "El Retiro").

- 17an de junio, (lundo) Luis Gonzalez prelegas pri "Problemoj en la tria aĝo".

- 19an (merkrede) je la 18,30 horo ĉe Ateneo (Prado,21) "Tertulia Amigos del Esperanto".

HISPANA KONGRESO EN TENERIFE

Finfine kelkaj madridanoj vojaĝos al La Laguna kune kun Miguel Fernandez kiu organizas la programeron "Lirika Festo" kiel la plej gravan parton de la Kongreso-homaĝo al elstara samideano Juan Regulo Perez. Ankaŭ la koruso, gvidata de Pedro Vilaroig, vojaĝos tien, kaj partoprenos en programero kiun, nun, Miguel kaj Pedro preparas.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n°98. MADRID-28012

LICEO ... ATOCHA, 98, 4º MADRID-12

En Madrido la 9-an de marto, je la 10-a h. kunsidis en la Centra Oficejo de HEF, 20 personoj, prezidataj de la Prezidanto de HEF S-ro Alonso Núñez. Oni interkonsentis la jenan tagordon:

1.- Raporto pri la Fondaĵo Esperanto
2.- Centra Oficejo de HEF
3.- Boletín
4.- Informiloj pri Esperanto
5.- U.K en Valencio
6.- Kongreso en Merida
7.- Venonta Kongreso en Kanariaj Insuloj
8.- Vortaro

1-RAPORTO PRI LA FONDAJO ESPERANTO

S-ro Azcuénaga, kiel nova membro de la Fondaĵo informis pri la aktivaĵoj de la Fondaĵo Esperanto dum la pasinta jaro. La Prezidanto dankis lin pro la informo.

Oni traktis la diversajn problemojn de la Fondaĵo, kaj S-ro Hernandez informis pri la interparola telefonado kun la Sekretariino de la Fondaĵo F-ino Inés Gastón, per kiu ŝi sciigis lin ke la granda stoko de la verko D. Quijote ne plu povas esti ĉe ŝi (ĝisnuna sidejo de la Fondaĵo) pro translokiĝo. Oni trovos solvon por la temo. S-ro Azcuénaga proponis ankaŭ skribi al F-ino Gastón kaj aliaj membroj de la Fondaĵo por atingi la Identigan Kodon, hodiaŭ necesa.

2.-CENTRA OFICEJO DE HEF

S-ro González Aboín legis la kontojn de la pasinta jaro.
Sekve, S-ro Marcos Cruz enkondikis la temon pri la plibonigo de la aktivaĵoj ene de la oficejo, informante pri la enkomputigo de la ekzistantaj libroj kaj pri la bezono farbi la ejon.
La ĉeestantoj venis al konkludo ke la venontaj taskoj de la oficejo devas esti ĉefe ke ĝi funkciu kiel centra informejo kaj kiel centra librejo kaj por tiu lasta celo la libroservanto S-ro Hernández pretas lasi en deponejo librojn en la Centra Oficejo.

Per sekreta voĉdono oni elektis la komisionon kiu okupiĝos pri la bona funkciado de la oficejo, inter kvar prezentitaj kandidatoj,



laŭ la jena baloto:

Marcos Cruz......... 15
J.M. González Aboin 14
Jorge Camacho .... 13
Francisca Yruegas 3

Do, la komisiono restis fine formata de S-ro cruz, S-ro Aboin, kaj S-ro Camacho.

Kiel kunlaborantoj prezentiĝis volonte plurajn personojn kiuj helpas kaj helpos en la taskoj.

La ĵus naskiĝinta komisiono havos kiel taskojn:
Harmoniigi la agadon de la madrida esperantistaro
Agi libere nome de HEF en la Centra Oficejo, ĉiam ene de la Statutoj

Esti deponejo de fotokopioj de la leĝaj Statutoj kaj aliaj gravaj dokumentoj de HEF.

3 BOLETIN

La S-ro Redaktoro S-ro Marco Botella emfazis la gravecon de la 300-a numero de Boletin, jam en la presejo, kaj la Prezidanto dankis publike lian agadon, ĉar li ricevis plurajn leterojn enfazante la bonan kaj regulan aperigon de Boletin.
S-ro Marcos Cruz petis meti anonceton en la bulteno por ke ĉiu funkcianta Grupo de la lando sendu al la Centra Oficejo informojn pri la kursoj, datoj, ĝia ĵusta adreso k.t,p.

Oni ankaŭ pritraktis la temon de la Boletin resenditaj al la redakcio, pro diversaj kialoj, kaj oni proponis enspezi la kotizojn pere de Bankoj.

S-ro Marco Botella proponis la plialtigon de la jaraj kotizoj de HEF en la venonta Generala Kunsido de HEF, pro la plialtigo de la poŝtaj tarifoj.

4- INFORMILOJ

Oni interkonsentis pri la taŭgeco pretigi 4 paĝan cirkuleron pri Esperanto, en hispana lingvo, kiu estu sendita kune kun Boletin. Krom tiu cirkulero S-ro Valen daŭrigas la laboron pretigi mezgrandan broŝuron pri Esperanto.

La prezidanto parolis pri la problemo de la financado de tiuj broŝuroj, ĉar HEF ne havas monon por tio, kaj la libroservanto proponis la eblecon studi la financadon de la 4 paĝa simpla informilo

pere de Libroservo kiam ĝi estu preta.

Je la 1-a h. p.m. oni haltis la kunsidon por okazigi la Seminarion pri Komputiloj

Je la 4,40 p.m. oni daŭrigis la kunsidon, ĉifoje en la Madrida Esperanto Liceo, Str. Atocha 98.

5.-U K EN VALENCIO

Antaŭ la ebleco okazigi Universalan Kongreson en Valencio dum 1993-a S-ro Casquero informis ke eble UEA aprobos en la UK en Bergeno la oficialan inviton de Hispanio.
Antaŭ tiu evento, li informis ke urĝas scii se UEA akceptas aŭ ne, por peti la Kongresan Palacon de Valencia, por peti la oficialan poŝtmarkon kaj peti la oficialan akcepton de Moŝto la Reĝo, kiel Honora Membro de la Kongreso.

Oni interdiskutis pri la kapitala garantio postulata de UEA por la Universalaj Kongresoj kaj pri la problemoj de ĝia efektiviĝo pro la nunaj moncirkonstancoj de HEF.

6.- NACIA KONGRESO EN MERIDA 1992

S-ro Cabezas informis ke la preparado iras laŭbona vojo kaj ke eĉ la skabeno pri kulturo de Mérida vojaĝos al La Laguna por oficiale inviti la ĉeestontojn al Mérida. Li ankaŭ postulas specialan aranĝon por prezenti videon pri Ekstremaduro, kaj la Prezidanto diris ke tiu video devas esti en Esperanto.

Oni interparolis pri la plej taŭgaj datoj por la kongreso, proponante fine de aprilo (30-a..) ĝis la 3-a de majo kiel eblaj datoj havante postkongreson en Portugali. la sekvontajn tagojn, kune ku.. la Portugala e. Asocio.

Ŝ-ro Cabezas informis ke la 13 kaj 14-a de aprilo ĉijare okazos la 7-a renkontiĝo Luso-Ekstremeña en Caja Extremadura.

Sekvante pri la temo de la Kongreso, la Prezidanto proponis ke la kongresejo estu samtempe manĝejo kaj dormejo, se eblas, sed



S-ro Cabezas proponis kiel plej taŭgan la okazigo de la Kongreso en la "Casa de Cultura" de Mérida, ĉar la urbo ne estas granda kaj la kongresanoj povas loĝi en apudaj hoteloj.

7.- NUNJARA KONGRESO EN LA LAGUNA

La prezidanto informis ĝenerale pri ĝi.
Poste S-ro Miguel Fernandez informis pri la I-a Lirika festo tie okazonta kaj ke li ricevis bonan reagon de la hispanaj kaj eksterlandaj poetoj kaj verkistoj. Ankaŭ okazos muzika lirika spektaklo kun son kaj lum'efektoj.

La Prezidanto diris ke en la kongreso oni prezentos novajn librojn, Prŭniversitatajn Kajerojn kaj du videojn, unu pri Ekstremaduro kaj alian pri agado en Azio.
Krom la tago por turismadi, oni pretigos paralelan turisman agadon por akompanantoj de la kongresanoj.
Ankaŭ estas antaŭvidebla seminarieto pri konjugacio.
La Prezidanto emfazis la bezonon de la junulara partopreno kaj ke ili kunlaboru aL LA BONA REZULTO DE LA KONGRESo kaj aprobis ke la junuloj ĉeestantaj transdonu tiun senton en la junulara tendaro okazonta. S-ro Camacho diris ke la kongreso ne devas koincidi dum somero ĉiuj, sed ke ili okazu en malsamaj datoj.

8.- VORTARO

S-ro Marco Botella informis pri la letero ricevita de KAE pri la ekzisto de manuskripto de vortaro farita de S-ro Mimó, kaj la deziro de la katalunaj esperantistoj ke la Federacio eldonu ĝin.Oni kunsentis pri la nuntempa bezono de vortaro Esperanto-hispana.
Car ankaŭ S-ro De Diego preparas por Venezuela E-Asocio vortaron, kaj ankaŭ ili petas la kunlaboron de HEF, oni multe diskutis pri la diversaj eblecoj sed oni konkludis ke la nuna financa situacio de HEF ne permesas eldoni iun vortaron, kaj eventuale nur oni reeldonos la vortaron de Tudela, ĉar tio estas malpli multekosta.

Car ne estis pliaj demandoj, oni finis la kunsidon je la 7,30 p.m.

Protokolo farita de R. Urueña

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n°98. MADRID - 28012



## KATALUNA LINGVO AGNOSKITA

Per 188 voĉoj favoraj, neniu kontraŭ kaj tri sindetenoj, la Eŭropa Parlamento aprobis rezolucion petantan de la komisiono kaj de la konsilio la agnoskon de la kataluna lingvo. Tiu decido respondas al peto farita de la kataluna kaj baleara parlamentoj, prilaborita de la kristan-demokrata deputito Vivian Reding el Luksemburgo, kaj apogita de aliaj parlamentanoj. En la praktiko, tiu agnosko ne signifas la uzadon de la kataluna lingvo kiel oficialan aŭ laboran lingvon de la komunumo, sed ĝi agnoskas ke estas eblecoj uzi tiun lingvon por la publikigo de la traktatoj kaj fundamenta leĝaro de EK, en la programo -Lingua- por lernado kaj perfektigado de eŭropaj lingvoj, tiel kiel uzi tiun lingvon en la parolaj kaj skribaj rilatoj kun la publiko en la oficejoj situantaj en la aŭtonomaj komunumoj de Hispanio.

(Ĉi tiu novaĵo aperis en MONATO

## ADIAŬ AL PEPE RAPADO

Denove tiun-ĉi monaton, ni havas malnovaĵon. Temas pri Jose Rapado, membro de MEL kaj unu el niaj instruistoj kiam en la Liceo funkciis samtempe 3 kursoj. Ĉi tiu lingvaj-amanto forpasis de kora malsano. Pace ripozu.

## DON KIĴOTO

Ĉu vi ankoraŭ ne havas la ĉefan hispanan literaturan verkon? Nun vi povas aĉeti ĉe MEL po 3.500 pesetojn. La verkon tradukis Fernando de Diego.

Ni havas nur du ekzemplerojn.

## MAMOJ DE VIANA



La Mamoj de Viana. Desegnis C.Mosteyrin

Feliĉe grimpadis Licea Teamo la maldekstran mamon (Laŭ la flanko de Viana de Mundejar). La manĝo sur la mam-pinto estis ne forgesebla, precipe pro la mirinda pejzaĵo kun la atom-centralo kiel fono. Vespere la grimpintoj vizitis la nuklearan centralon.

**FELIĈAN SOMERON!!!. ĈIS SEPTEMBRO.**

MEMBRARO DE UEA EN 1990

- 97 landoj ................ 32.869 membroj
- Hispanio ................ 1.054 "

VENONTAJ KONGRESOJ

(Pli da informoj en "Heroldo" n-ro 16 aprilo kaj "Esperanto" n-ro. de marto.)

Julio 15-19; - 51a Hispana Kongreso. La Laguna, (Tenerife).

Julio 20-26; - 47a Internacia Junulara Kongreso. Karlskoga. Svedio.

Julio 27 Aŭgusto 3; - 76a U.K. en Bergen (Norvegio).

Julio/Aŭgusto. Diversaj programoj en Kastelo Gresillon.

Oktobro 7-13; - Esperantaj Labortagoj. Torrox. Malaga.

Oktobro 29 Novembro 2; - Literatura staĝo en "La kvin petaloj", Bouresse. Francio.

Novembro 1-3; - 25a Kataluna Kongreso. Tarragona. Hispanio.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA ...38, MADRID - 28012

SIDEJO DE MEL

Post kelkaj monatoj finfine la membroj de la koruso-orkestro purigis nian sidejon. Vere organizis purig-vicon por la venontaj tempoj. Vere la vitroj aspektas aliaj. Kiel diras Lupe "Donde la limpieza campea, resplandece la corchea".

Pedro kaj Platas tapetis la plafonon de la mansardo kaj oni aranĝis/ordonis/arĥivis revuojn, librojn, paperaĵojn, k.t.p. por uzi tiun lokon por vintraj konverzaciaj rondoj.

La malgrandaj ĉambroj ankaŭ estis ordigitaj. Unu por la koruso kaj la aliaj du por la arĥivo de revuoj (enskatoligitaj) kaj aliaj vendaĵoj ankaŭ enskatologitaj.

VOLONTULOJ POR UK EN SEULO
1994 ĈE KOREA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu havas sperton en la progresigo de UK, instruado de Esperanto kaj prelegado. Gastos ĉe esperantistoj, laboros ĉe la oficejo de KEA, gvidos kurson kaj prelegos en diversaj urboj (kaj do tutlanda vojaĝo garantiataj).
Volontperiodo: 6-12 monatoj. Detalan sinprezenton kaj deziron sendu al KEA: CPO KESTO 4258, SEULO, KOREUJO (kOREA)

MILITSERVO EN ESPERANTO

La Centra Oficejo de UEA en Rotterdam akceptis civilservanton el Nederlando. Li komencis 16-monatan servoperiodon en la Biblioteko Hodler por ordigi kaj katalogi ĝian kolekton.

VENONTAJ KONGRESOJ

Oktobro 7-13, Esperanta labortagoj. Torrox. Malaga

Oktobro 29 novembro 2.- Literatura staĝo en "La kvin petaloj", Bouresse. Francio.

Novembro 1-3; 25a kataluna kongreso. Tarragona. Hispanio.

2a afrika kongreso en Benino, je la fino de 1991.2

HISPANA ESPERANTA KONGRESO

Areĝo da madridanoj partoprenis en la lasta hispana kongreso. La MELanoj Miguel Fernandez kaj Pedro Villarroig preparis majstre Lirikan Feston. Ĝi konsistis el tri tagoj. En la du unuaj, Miguel, helpate de Ana Manero kaj Pedro A. Garrote, legis poemojn kaj rakonton el malsamaj internaciaj verkistoj, kio plaĉis al la aŭdantaro.
En la tria tago, Miguel prezentis verkon propran, kies muzikon komponis Pedro Villaroig. Miguel kantis, same kiel Laura, Ana Manero legis la prozaĵon, kaj la koruso "Verda Stelo" kantis, kiel neniam aŭdite, sub la taktobastono de sia direktisto.

Sed la Lirika Festo ne estus sukcesinta tiel, sen la helpo de la madridano Fernando Moral, kiu lastmomento aliĝis al la kongreso kaj, ke sen lia helpo, ni estus havinta grandan problemon. Li, diletante, sed tre bone, regis la lumon kaj sonon. Dankon, Fernando.

UNIVERSALA KONGRESO EN VALENCIO

Finfine Valencio havos sian U.K.-n en la jaro 1993.
Augusto, post multa laboro kaj kelkaj vojaĝoj al la pasintaj Universalaj Kongresoj, atingis por sia urbo, ke la estraro de EUA voĉdonu favore al la hispana urbo. Augusto estis en Madrido la lastan semajnon de aŭgusto, kaj aro da madridanoj kunvenis, petite de li, en la ejo de HEF. Li informis nin kaj petis de ni helpon dum kaj antaŭ la U.K.. Kompreneble la madridanoj helpos lin kaj eble MEL partoprenos en la UK kadre de la Lirika Festo.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n° 98. MADRID - 28012

# N I A   V O Ĉ O

Eksempleroj: 125 OKTOBRO 1991

## SALUTO DE LA PAPO EN ESPERANTO

Dum kunveno de gejunuloj en Pollando, la 15an de aŭgusto, la Papo salutis en E-o jene: "Je la fino esperante, karegaj junuloj la sperto de la Kredo travivitá ĉe la piedoj de la Nigra Madona restu neforigeble gravurita en viaj koroj. Sanktega Maria akompanu vin !.

## VALENCIA KONGRESO

La "Caja de Ahorros de Valencia" donis subvencion de 50.000. pesetoj por la eldonado de disko, kiun memore de la Universala Kongreso en 1993 kaj kun la hispanaj popolkantoj, faros la Esperanta-Ĥoro "Verda Stelo" de Madrido.

## INTERNACIA SEMINARIO

35a Internacia Seminario de Germana Esperanta Junularo.
Temo : Ameriko ĉu 500 jaroj de civilizacio aŭ kolinilismo ?.
Okazos en Cuxhaven (Nordgermanio) de la 27a de decembro 1991 ĝis la 3a de januaro 1992.

## INTERNACIA ESPERANTA FESTIVALO

7a Iternacia Esperanta Festivalo okazos en Parizo de la 9a ĝis la 11a de novembro. Juna paro gastigas vin en malgranda triĉambra apartamento kun tre favora ekonomiaj kondiĉoj, se vi estas vegetarano kaj nefumanto.
Skribu S-ron Eric Benech; 159 rue Marcadit; F-75018 PARIZO.

## TELEFONA ESPERANTA GAZETO

Se vi ne timas la telefonkosto vi povas aŭskulti "La Papago" iam ajn, ĉu tage, ĉu nokte. La temoj traktataj estas tre diversaj: spritaĵoj, eseoj, informoj, politiko, poemoj, kantoj ktp. La redaktejo estas en Montrealo kaj la telefonnumero estas 1 514 270 0054.

## ESPERANTAJ KURSOJ EN MADRIDO

- Kultura Centro. Strato Maestro Alonso, 6.
  Instruisto S-ro. F. de Diego. Merkrede je la 18:30.

- Hogar de Pensionistas de Puente de Toledo.

## KORESPONDAJ KURSOJ

- Hispana Esperanta Instituto
  Apdo. 2429. E 08080 BARCELONO.

- Andaluza Esperanto Unuiĝo.
  Apdo. 344. 29080 MALAGO.

- Kultura Asocio Esperantista.
  Font Nova, 32. 08202 SABADELL.

VENONTAJ PROGRAMOJ

- Ĉiulunde konversacia rondo je la 19:00 horo en Atocha,98-4
- Ekde oktobro (16an) la trian merkredon ĉiumonatan "Tertulia Amigos del Esperanto" je la 18:30 ĉe "Ateneo de Madrid" Strato Prado, nro. 21.
- 21an de oktobro prelegos Lupe Sanz pri "Perditaj urboj en Araba Duoninsulo".

VENONTAJ KONGRESOJ

- Oktobro 7-13; Esperantaj labortagoj. Torrox. Malago.
- Novembro 1-3; 25a Kataluna kongreso. Tarragona. Hispanio.
- 5-10 junio de 1992 ; 1a Europa kongreso en Verona. Italio.
- 2-9 adgusto de 1992; 48a Internacia junulara kongreso en Montrealo. Kanado. Gastigas la IJK.
- 16-22 de majo; 44a Internacia fervojista kongreso okazos en Munster. Germanio.

**nia voĉo**

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO

DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:

c/ ATOCHA nº98 . MADRID - 28012

N I A V O Ĉ O

Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4º
28012 Madrid

Ekzempleroj: 115

Novembro 1991

## K R I S T N A S K A L O T E R I O

Ni jam havas loterion. La numero estas 45.676 kaj la biletoj kostas 200 pesetojn (el ili 40 estas kiel donaco al MEL). Se vi deziras aĉeti bv. sendi ĉekon (nur por Madrido), je la nomo de Esperanto-Liceo de Madrido. Lunde vespere ni disdonos biletojn por vendi.

Ni kalkulas je vi!!!!.

## M.E.L. K O T I Z O D E 1991

→ Ĉu vi pagis vian kotizon de 1991 al Liceo??? Vi ŝuldas ptj.

Se ne, bv. sendi ĝin kiel eble plej rapide por ĉeko je la nomo de Esperanto-Liceo de Madrid aŭ persone ĉe MEL. Jara kotizo 2.000 ptj.

## UZITAJ POŜMARKOJ

MEL sendis plurajn milojn de Poŝmarkoj al S-ro Claude Cayzac (B.P. 7073 F-34080 Montpellier- Francio). Li vendas tiujn materialojn por pagi lecionojn de perkoresponda kurso de Esperanto al Afriko. Li jam havas 540 gelernantojn kiuj dankas helpon de MEL. Bv. sendi viajn uzitajn poŝmarkojn al MEL

## PASPORTA SERVO 1991-1992

Jam aperis nova eldono de tiu-ĉi libro kiu ofertas amason da eblecoj malkovri la plej kaŝitaj lokoj de la mondo. La libro, farita de TEJO, listas 1125 adresojn en 59 diversaj landoj tutmonde de gastigantoj kiuj akceptas en siaj domoj esperantistojn malmultekoste. Pasporta Servo mendebla ĉe: Torsten Lemke. Wetterseerstr. 1. O-1100 Berlin. Prezo kun sendokosto estas 12 DM.

HEF-CO Spaco

- O R O S -

Juveloj, horloĝoj, propa metiejo,ktp.

Demandu pri Manolo (Isabel Otín)

Vi atingos Esperantan prezon

Paseo de Extremadura nº 1
Antonio Zamora 16

Spaco rezervita por novaĵoj de HEF-CO

PROPAGANDA FLUGFOLIO

MEL preparas novan hispan-lingvan propagandilon en kiu aperas adreson de "vere funkciantaj" grupoj. Ni petas al ĉiuj esperantaj grupoj bv. sendi (antaŭ la 15an de decembro) aktualan adreson, telefono, fakso, k.t.p., al Madrida Esperanti-Liceo. Ankaŭ aperos esperantaj librovendejoj kaj grupoj kiuj instruas koresponde:

VENONTAJ PROGRAMOJ

Ĉiu lunde je la 19,00 horo okazas KONVERSACIA RONDO ĉe MEL. Atocha 98-4º

11an novembro. Juan Carlos Ruiz prelegos pri "Evoluado de Madrido tra la tempo" Je la 19,00 ĉe MEL.

20an de novembro (MERKREDO) Tertulia "Amigos del Esperanto je la 18,30 h en Ateneo de Madrid. Strato: Prado nº 21. Gvidas Lucrecia San Antonio kiu ĵus celebris sian 80an naskrevenon.

18an de novembro ĉe Ateneo je la 19,30 h. Soledad Santamaría, poetino, prezentos sonet-poemaron "Amor Cantemponáneo" ĉiu esperantistosj estas invititaj.

14an de decembro (SABATO) ZAMENHOFA BANKEDO ĉe Hotel Puerta de Toledo. Je la 14.00 h. Antaŭ-pago (2.500 ptj)necese, en la Liceo lunde)

ANKORAŬ KANARIAJ INSULOJ

Carmen Suárez komentariis lumbildojn faritajn dum la kongreso de la Laguna kaj en la post-kongresa vojaĝo de madridaj esperantistoj tra Gran Kanario kaj Lanzarote.

Loterio 45.676

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha, 98-4' 28012 MADRID

Ekzempleroj: 115 Decembro 1991

HEF Oficejo suferas ekonomian kaoson, kiel HEF mem. ĉi subteniĝas dank'al financaj apogoj de kelkaj esperantistoj. Ĉu vi aŭ via grupo povas helpi ĝin ?. Bv. sendi ĉekon je la nomo de Esperanto Liceo de Madrid-HEF



EKDE SEGOVIA AL KARLSKOGA (SVEDIO)

Manolo, kiu estis lernanto de Cesar Mosteyrin, partoprenis somere en la junularkunveno de Karlskoga.
Nia brava samideano trajne veturis al Hamburgo kaj poste biciklis ĝis Svedio kune kun 20 gesamideanoj.
En la renkontiĝo ankaŭ partoprenis kataluno.

HISPANA KONGRESO EN MERIDA. 1992

Francisco Cabezas, prezidanto de LKK, estis en Madrido kaj disdonis aliĝilojn kun speciala aliĝ-kotizo ĝis la 30-a de decembro. Ankaŭ li montris belan turism-broŝuron de Merida eldonita de la Urbestraro. Ne forgesu ke la Kongreso okazos ekde la 30-a de aprilo ĝis la 5-a de majo.

SUBVENCIOJ

Madrida Autonoma Komunumo NEIS al MEL Subvencion por eldoni la libron "La fenomeno Esperanto", tradukitan de Marcos Cruz
Motivo: Eldonado de libroj ne estas kultura programo.
Ankoraŭ ne respondis Ministerio pri Eksteraj Aferoj rilate saman finacsubvencion. Ni havas bonan impreson.

KAMAĈO ELDONIS LIBRON

Georgo Kamaĉo, unu el HEF-Komisionanoj por Centra Oficejo, eldonis libreton (40 p.) de rakontoj kaj noveloj. Oni povas peti je BERO, P.O. Box 13492 Berkeley, CA 94701. USONO
Prezo 4,5 $ inkluzive sendokosto. Ni jam petis ekzempleron por MEL-Biblioteko.

ESPERANTO LITURGIA LINGVO


MEL ricevis fotokopion (Dank'al Cesar de Segovio) de la dekreto kiu aprobis Esperanton kiel lingvon uzeblan en kristana liturgio kaj oficialan tekston de meso-libro.

MEL

DEZIRAS AL VI

FELICAN

1992




Suvereneco

VENONTAJ PROGRAMOJ

Ĉiu lunde je la 19:00 h. konversacia rondo ĉe Liceo. Atocha 98,4

En Segovio, ĉiu merkrede vespere, en Sport-domo.

14-an de decembro SABATO. "Zamenhofa bankedo", Hotelo PUERTA DE TOLEDO, Placo Puerta de Toledo, Prezo 2.500 Ptojn. Antaŭ pago estas necese.

18-an de decembro. MERKREDO. Tertulia "Amigos del Esperanto". Ateneo de Madrid, Prado 21, Je la 18:30 H. Gvidas Lucrecia San Antonio.

Kiel dum la lasta jaro en JANUARO ni antaŭdiskutos diversajn punktojn de tagordo de <u>GENERALA ASEMBLEO kiu okazos la 28-an de januaro</u>.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n°98. MADRID - 28012

GIRONA ESPERO
Apto 509
17080 GIRONA
0

(1)

DISSENDIS MADRIDA ESPERANTO LICEO

INFORMO PRI ESTRAR-KUNVENO DE HEF en Madrido, en posttagmezo de vendredo 8a kaj mateno de sabato 9a novembro 1991, en la sidejo de MEL.

1) Alonso ricevis inviton veni duan fojon al la Ministerio por Edukado, por priparoli la aferon Preuniversitataj Kursoj. Li tial profitis la okazon por kunveno, malgraŭ la fakto, ke pluraj homoj ne povus veni; ankaŭ, pro la hasto, li forgesis averti aliajn. Li prezentis en la kunveno kaj ripetas tie ĉi pri pardonpeto kaj bonvola komprenemo.

2) Privata informo, ankoraŭ tute nepublicebla: Li faris kvaroblan peton al la Ministerio: Oficialaj diplomoj por aŭtoroj, profesoroj, lernantoj en la Kursoj. Financadon por eldono de du kursokajeroj kun akompanaj kasedoj. Pretigado de televidkurseto fare de la oficialaj teknikistoj kaj rimedoj. Helpo atingi aliajn oficialajn instancojn (Ministerio pri kulturo, k.s.).-- Rezulto: Temas pri ambicia peto, kiu preterpasas la povon de la persono kiu min akceptis tie; oni devas munti dosieron pli kompletan por venigi ĝin en la manojn de la plej altaj gravuloj tieaj. ((Kompreneble, mi tion faros)).

3) En vendreda posttagmezo ĉeestis Alonso, prezidanto; Cabezas, organizanto de kongreso en Mérida; Miguel fErnández kaj Pedro Vilarroig, organizantoj kaj aŭtoroj por la Lirika Festo en Mérida; s-ro Aboín, por la CO, kaj pluraj aliaj MELanoj.- Informis ke ne povus veni: ĉefredaktoro Marco Botella, pro malsano; sekretario López Hernández, pro malsano de familiano; s-ro Augusto Casquero, organizanto de UK en Valencia, kaj s-ro Bernabeu, kasisto, ĉar ili ambaŭ devus en la tuja sabato kunveni kun UEA-funkciuloj irontaj Valencion por trakti pri la UK.

4) La plej grava afero traktita estis arangô de la Kongreso en Mérida, kaj, kadre de ĝi, de la Lirika Festo. Jen la malneto kiun ni atingis pri la programo:

ĝi okazos inter ĵaŭdo 30a aprilo kaj dimanĉo 3a majo 1991, ambaŭ inkluzivite. Dum Pasko estus neeble pro manko de hotellokoj. Oni bone atentu, ke la, 2a kaj 3a de majo estos festaj tagoj.-- En sabato 2ª okazos la plej granda parto de internaj laboroj (jarraporto, financoj, debato pri organizado, preparlaboroj de UK, ktp. En la vespero de tiu sabato okazos la dua lirika festo; la kongresanoj ricevos en la kongreslibro la tekston de la ludotaj poemoj k.s; temos pri publika prezento, kun invito al la civitanoj de Mérida; tiucele en la komenco oni klarigos hispanlingve la enhavon, signifon, ktp. Por la Lirika Festo ni probable disponos tre taŭgan ejon, pri kio jam zorgas s-ro Cabezas.

La matenon de dimanĉo, eventuale ankaŭ parton de la posttagmezo, ni dediĉos al vizitado de la urbo, muzeoj, ktp.- Aliaj kulturaj-distraj arangôj: POrtugala grupo kantos fadojn en Espranto; E-lernantino ludos akordionon; folklora grupo prezentos al ni dancojn, kantojn, muzikojn de Extremadura.

Ni planas arangi altnivelan debaton en la hispana pri la monda lingvo-problemo, kun partopreno de universitataj profesoroj kaj fakuloj; aperta al la publiko, kaj kun invito al televido, radio, k.s.

(Pardonu, mi forgesis diri jam pli frue, ke en la Lirika Festo ludos bazan rolon ne nur poeto(j), sed ankaŭ la Koruso Verda Stelo, ĉiam sub la direktado de s-ro Villaroig).

En ASKH prelegos s-ro Serrano pri "Legado de la verko Don Kiĥoto laŭ altipa vidpunkto", en kiu estos li kiu faros demandojn al la ĉeestantaro. Kadre de ASKH okazos ankaŭ provleciono(j) pri la Preuniversitataj Kursoj, surbaze de specifaj studkajeroj.

Pro financaj kialoj oni decidis ne mendi mem ĉi-jare la filatelan stampilon. Tamen, se interesiĝantoj pri tiu afero pretas mem financi la tuton, ja HEF volonte ĉion arangôs. Pri tio ni petas interesiĝantojn sin turni mem rekte al la kongresorganizanto, s-ro Cabezas.

Granda probablo ekzistas, ke la kongreso disponos senpagan kaj tre adekvatan ejon por la junularo, en 4- kaj 8-litaj ĉambroj. Pri tio ni informos laŭ la iro de la afero. Ni petas la junularon ĝi HEJS-on ne maltrafi tiun okazon!!

TRE GRAVE: Ni petas nian ĉefredaktoron ke li informu en Boletín, ke pro postuloj de Hoteloj en Mérida (kien jam alfluas rezervopetoj por EXPO '92), oni devas jam nun antaŭmendi rezervon, kaj pagi por ĝi almenaŭ la duonon de latuta kosto; sen tia antaŭpago, la kongreso ne povus respondeci pri tiu punkto, kaj do la kongresanoj devus rekte zorgi mem pri loĝado. (S-ro Cabezas sin turnos al s-ro Marco kun indiko de prezoj k.s.).

5) Ni traktis la peton de Portugala Esperanto-Asocio, pri nia opinio rilate postkongreson post Mérida, kaj pri Portugala Kongreso. Ekzistis ĝenerala interkonsento pri jenaj temoj, kaj pri tio s-ro Cabezas informos PEAn okaze de la decembra renkontiĝo kiun ili organizas por monato decembro:

a) Ĉar nia kongresa kalendaro ne ebligos ke multaj hispanoj vojaĝos POrtugalion post la fino de nia kongreso (ĉar lundo 4ª majo ja estas labortago por ĉiuj), ni pensas ke prefere oni muntu nenion oficialan rilate postkongreson, sed simple dum la kongreso mem oni esploru, kiom da hispanoj volas kaj povas veturi Portugalion, kaj oni povas munti ian kunvenon aŭ viziton, k.s.

b) Rilate la unuan Portugalan Kongreson (1992) ni venis ankaŭ al konkludo, ke oni ne povus kalkuli pri amasa partopreno de hispanoj (negrave ĉu ĝi okazus en la nordo aŭ aliloke, ĉar ja ankaŭ okazos hispana, eŭropa kaj internacia kongresoj!!. Do, ke oni povas esperi nur pri malgranda kvanto da hispanoj, (el kiuj tamen iuj povus prelegi aŭ kunlabori iel ajn).

c) Tamen, ni pensas, ke ni devas studi en Mérida pri la ebleco, ke en la jaro 1994 PEA organizu la Unuan Iberian Kongreson, kaj eventuale eĉ pensi pri alternado en la organizado de novaj kongresoj, ĉiun duan jaron en Hispanio, respektive en Portugalio.

d) Ni plian fojon invitas nian karan PEAn iel partopreni protagonisme la ASKH (Artaj, Sciencaj kaj Kulturaj Horoj de HEF-kongresoj). Ni ankoraŭ kun admiro memoras la jamajn partoprenojn. (Ni petus ke temu minimume pri unu horo, sed ja pli da horoj estus bonvenaj, kaj jam estas je ilia dispono).

6) Pri strukturo de la debato celita por la ĝenerala publiko okaze de Mérida-kongreso: (Por la kazo, ke ĝi montriĝos strukture kohera kaj grava, ni devus ĝin registri per video):

a) Temu pri negranda partoprenantaro; tri persnoj, maksimume kvar. Ĝi daŭru almenaŭ 1 horon.

b) Enhavo (nun proponata, sed oni povus ĝin ŝanĝi se pli bonaj proponoj venos: ¿Kíaj estas la faktaj bezonoj de internacia komunikado?. ¿Kía estas la fakta stato, kun takso kaj mezuro de la eventuala distanco inter bezonoj kaj realo?. ¿Kía estas la fakta celo de la koncernaj programoj kaj aspiroj de la diversas edukministerioj, de la instancoj de la Eŭropa Komunumo?. ¿Kía estas la fakta aspiro de la lastaj, plej freŝaj didaktikaj proponoj?. ¿Kía estas la diferenco inter la teoriaj celoj kaj la teknikistaj proponoj?. ¿Ĉu oni taksas la nunan situacion digna?. Se ne, ¿kíaj estas la vojoj, proponoj, alternativoj por veni al digna situacio?.

7) Niaj revuoj informas pri la parolo de la Papo en Esperanto al junaj pilgrimantoj. Estas grave, ke ĉiu grupo informu la koncernan (ĉef)episkopon pri tiu evento, kun akompano de foto, la originalan tekston, k.s.

8) En la sabata mateno ĉeesti s-ro Alonso, s-ro Aboín, gesinjoroj Hernández Urueña kaj aliaj. S-ro Alonso resumis pri la laboro en la antaŭa tago, kaj oni traktis ĉefe jenajn aferojn:

9) Ni bezonas periodan informilon en la hispana. Pri ties redaktado ek-okupiĝis la vicprezidanto, s-ro Alberto Franco. S-ro Alonso petas ke oni prezentu al s-ro Marcos Cruz la peton, ke li bonvolu kunlabori tiurilate.-- Temu pri kvarpaĝa informilo, kun la sama periodeco, kiel Boletín.- Oni ĝin dissendu ja al ĉiuj HEF-anoj, sed ankaŭ al presagentejoj, televido, radiostacioj, ĵurnaloj, k.s.
S-ro Alonso transsendos al ili la materialon "Influo" kiun UEA daŭre sendas al li, kaj kiu certe estos utila por tia laboro.

10) Ĉar ni plu urĝe bezonas seriozan informilon, Libroservo reeldonos ĝin, kaj ties koston oni repagos al ĝi grade per la enspezoj de la Servo.
Krome, s-ro CAmacho estis petata, kaj li konsentis, mem zorgi, eventuale kun helpa teamo, proponi poluron de tiu verketo por eventuala eldono.

11) HEF definitive eldonos flugfolion taŭgan por varbilo-aniĝilo.

12) Oni traktis ankaŭ aliajn afer(et)ojn, sed ĉefe temis pri personaj, neĝeneralaj temoj, aŭ pri internaj taskoj. Inter ili elstaras la gratulon kiun la estraro esprimas al Marcos Cruz kaj lia teamo por la bona laboro farita/ata/ota en la CO: ni esperas, kaj deziras, ke ankaŭ la financa parto de ilia plano trafu sukceson, sen malutilo al la propra, persona poŝo!!.-
13) De tiu ĉi informo mi sendos kopion al ĉiuj cititaj personoj, ankaŭ al Adúriz kaj Azcuénaga. Mi petas la sekretarion, ke ĝXXXñĝXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX li ĉerpu el tiuj ĉi folioj materialon por la oficiala protokolo,

Amike, A. Alonso
11.11.1991
A. Alonso Nuñez

# M E M O R I A   D E   A C T I V I D A D E S   1. 9 9 1

## ESPERANTO LICEO DE MADRID

Merece destacar la colaboración de Esperanto Liceo de Madrid (MEL) en la organización de las "Horas líricas", dentro del programa del Congreso Nacional de Esperanto celebrado en La Laguna (Tenerife). Gracias al trabajo de Miguel Fernández Martín y a la colaboración del coro "Vera Stelo", dirigido por Pedro Vilaroig, los tres actos poético-musicales programados fueron un rotundo éxito.

A continuación relacionamos las actividades llevadas a cabo por MEL durante el año 1991.

### ENSEÑANZA

Se han programado cursos básicos y de perfeccionamiento en diversos lugares de Madrid: Sede de MEL, Oficina Central de la Federación Española de Esperanto, Centro Cultural Ventas, Hogar del Jubilado Puente de Toledo, Centro Social de RENFE.

### CONFERENCIAS

Como es habitual el programa de MEL ha incluido conferencias sobre diversos temas, empleando siempre el idioma Esperanto. Se programaron las siguientes

.- Milito en la Golfo. J.C. Ruiz Sierra
.- Poemoj kaj kantoj de Lorca. M.Fernández Martín
.- Perditaj urboj de Arabia Duoninsulo. L. Sanz Bueno
.- Post la Kongreso de La Laguna. C. Suárez Fernández-Cid.
.- Peruo, la inka imperio. J.C. Ruiz Sierra

### PUBLICACIONES

MEL publica mensualmente el boletín de noticias "Nia Voĉo", distribuyéndose entre sus socios y todos los grupos esperantistas españoles.

En espera de obtener la subvención necesaria está el texto en español del original en Esperanto "El fenómeno esperanto".

Se e

### PARTICIPACION EN CONGRESOS

Esperanto Liceo de Madrid ha estado representado por alguno de sus miembros en los siguientes congresos y reuniones esperantistas.

.- Campamento Juvenil. Valencia
.- Encuentro hispano-luso. Cáceres
.- Congreso Español de Esperanto. La Laguna (Tenerife)
.- Congreso Internacional de Esperanto. Bergen (Noruega)
.- Congreso Ferroviario. Belgica

OTRAS ACTIVIDADES

.- Se han mantenido las siguientes tertulias en Esperanto:
   ~~Los lunes en la sede de MEL~~
   Los miércoles en la oficina de la Federación Española de esperanto.
   Una vez al mes en el Ateneo de Madrid

.- Se ha coordinado la relación inter-congreso de la directiva de la Federación Española de Esperanto, convocando reuniones en la oficina central de Madrid

.- Se ha prestado asistencia a numerosos esperantistas extranjeros que han visitado Madrid

.- El coro "Verda Stelo", apoyado por el Liceo, ha seguido incluyendo el Esperanto en su programa de polifonía religiosa y profana y en especial en la canción popular internacional.

Esto es un borrador del informe que se presentará en la Asamblea del próximo día 27 de enero.

Es muy importante que nos envies tus comentarios

Lupe
Secretaria
MEL

# HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
# FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Centra oficejo / Oficina central:
Rodríguez San Pedro, 13-3.°, p7.– E-28015-Madrid.– Tfno.: (9 1) 446 80 79

**Bonvolu sendi la korespondaĵon pri tiu ĉi letero al jena adreso / Rogamos envíen la correspondencia relativa a este escrito a la siguiente dirección:**


Urbo / Ciudad ______ Dato / Fecha ______ Registro n-ro ______

De:
Komisiono de la centra oficejo de Hispana Esperanto-Federacio

Al:
S-ro José María González Aboín, prezidanto de MEL

1991an decembron

Tre estimata samideano kaj amiko:

La komisionon de la centra oficejo de Hispana Esperanto-Federacio trafis decembra numero de la bulteno "Nia Voĉo", kaj ĉar rimarkeblas en ĝi kelkaj malpravaj, eraraj kaj senrajtaj asertoj pri tiu ĉi oficejo, farendas jenaj korektoj:

1e) La ekonomia situacio de la centra oficejo de Hispana Esperanto-Federacio ne estas kaosa, sed en tutaj ordo kaj kontrolo kiel neniam antaŭe. Oni rajtas konsulti la prian dokumentaron.

2e) Tiu kiu volas financi la laboradon ĝisnunan kaj ekdenunan pri la centra oficejo de Hispana Esperanto-Federacio, bonvolu turni sin ne al MEL sed al la oficeja komisiono mem. Oni rajtas elspezi senpere en la konton de la oficejo ĉe Caja Postal, kies numero estas: 0016436947. Kompreneble, oni sendu kopion de la enspezilo, por ke ni donu kvitancon kaj plu agu same malkaose kiel ĝis nun.

Neniu el la oficejkomisionanoj sendis al "Nia Voĉo" tiajn misinformojn, do malfaciletas imagi kiu kaj kiarajte faris. Kaj konsiderante kiom grave estas, ke senseiaj homoj publike misparolu sub aliies nomo senrajte, ni petas vin:

1e) En venontan "Nian Voĉon" enmeti suprajn korektojn tute sen ajna ŝanĝo.

2e) Bonvolu ekzorgi pri tio, ke MELan(in)o(j) ne plu (mis)agu kvazaŭ nome de la centra oficejo de Hispana Esperanto-Federacio, sen antaŭa konsento de la oficeja komisiono.

Aliprie, ankaŭ en la hispanlingva 1991a raporto pri MEL-agado estas eraraj asertoj:

1e) Neniu MELano reprezentis MELon dum valencia junulartendaro, ĉar neniu MELano partoprenis tiun aranĝon.

2e) MEL ne programis esperanto-kurson en la centra oficejo de Hispana Esperanto-Federacio (*).

3e) MEL ne pluigis konversacian rondon merkrede en la centra oficejo de Hispana Esperanto-Federacio, interkiale ĉar tute ne okazis konversacia rondo en la oficejo ekde marto, sed nur laboregado (*).

(*) Se enraporta "oni" (hispane "se") ne signifas MELon, tiuj informoj ne devus esti en MEL-raporto pri propraj jaragadoj organizitaj de MEL mem.

Kun espero de ekebligo por reala kunlaboro, tio estas, apuda agado samcela, sed nepre serioza kaj malfuŝa, salutas vin

José María González Aboín    Jorge Camacho    Marcos Cruz


Fondita / Fundada en 1947    N.° 4.592 del Registro de Asociaciones del M.° del Interior    C.I.F.: G-47026356
Asocio sen profita celo / Asociación sin finalidad de lucro.